



## LA 4A INTERKULTURA MAJRENDEVUO

okazos 23-30 de majo 2019

en Vroclavo kaj Złotoryja

sub patronado de la urbestro de Złotoryja, Robert Pawłowski,  
kaj ĝia organizanto estas la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado

Vroclavo\* kaj Złotoryja\*\* situas en Malsupra Silezio, Pollando. **VROCLAVO** estas **LA ĈEFURBO** de la pola regiono **MALSUPRA SILEZIO** kaj **ZŁOTORYJA** estas **LA ĈEFURBO** de la **POLA ORO**

**EN VROCLAVO** okazos la **5a Internacia Simpozio** – en prestiĝa loko: **Vroclava Universitato**, kaj la **7a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj** (provaŭdoj kaj koncerto de la premiitoj) – en alia prestiĝa loko: **FILHARMONIA**. Krome, en Vroclavo ni vizitos **famajn historiajn objektojn**.

**EN ZŁOTORYJA** okazos **AMO-seminario, laborsesioj, ekskursoj, serĉado de oro kaj solena koncerto por la loĝantoj**. Krome, ni vizitos la **kastelon en Grodziec** kaj la **landon de estingiĝintaj vulkanoj**. Ĉiutage **ni dancos, kantos** kaj laŭdezire **aranĝos lignofajron** kun rostitaj kolbasetoj kaj legomoj. Muzike akompanos nin **JoMo kaj Suzana**.

\***VROCLAVO** (pole *Wrocław*, legu: Vrocŭaf) **estas la ĉefurbo de Malsupra Silezio** – provinco en la sudokcidenta parto de Pollando. Ĝi situas ĉe la rivero Odro. Ĝi estas la kvara plej granda urbo de Pollando kaj grava centro de scienco kaj kulturo kaj ofte estas nomata: ”la urbo de renkontiĝoj”. Laŭ legendo, Vroclavo estis fondita ĉirkaŭ la jaro 1000 fare de la ĉeĥa princo Vratislav la 1-a, kaj ĝi estis nomita laŭ lia nomo.

En 2016 Vroclavo estis Eŭropa Kultura Ĉefurbo, kaj, laŭ Unesko, la Tutmonda Ĉefurbo de la Libro. En Vroclavo naskiĝis la katolika patronino de Eŭropo, Edith Stein – doktorino pri filozofio kaj monaĥino.

Vroclavo estas belega urbo kun riĉa historio kaj neordinara aspekto. Ĝi estas urbo de 12 insuloj kaj 112 pontoj. La urboplaco je la areo 3,6 hektaroj apartenas al unu el la plej grandaj en Eŭropo. Ĝi konservis sian spaco-sistemon de la dua duono de la 13-a jarcento. Vizitante la urbon, oni nepre devas rigardi la Muzeon de Sinjoro Tadeo, la pentraĵon *Panoramo de Raclawice* (unu el dekelkaj panoramaj pentraĵoj ekzistantaj en la mondo) ekspoziciatan en la filio de la Nacia Muzeo en Vroclavo, la konstruaĵon Hala Stulecia (Halo de Jarcento), kiu en la jaro 2006 estis enskribita en la liston de mondaj kulturaj heredaĵoj de Unesko, kaj la novan parton de la vroclava zoo, nomata pollingve *afrykarium*, kiu estas komplekso (la unua kaj sola en Pollando) prezentanta la akvan kaj surteran ekologiajn sistemojn de la afrika faŭno.

En Vroclavo la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado ĉiujare organizas la Eŭropan Festivalon de Esperantaj Kantoj, la Internacian Simpozion, la festivalon Vortbeleco en Esperanto, la Interkulturan Majrendevuon kaj multajn programojn por kaj kun neesperantista medio, pruvante, ke valoras profiti ĉiun okazon por informi pri Esperanto kaj por vigligi kunlaboron kun neesperantaj medioj.

\*\***ZŁOTORYJA** (legu: Zŭotorija) estas pitoreska urbo meze de la regiono Malsupra Silezio. Ĝi estas **la ĉefurbo de la pola oro**. Ĝis nun ekzistas subteraj koridoroj de la orminejo *Aurelia*.

En 1211 Złotoryja ricevis magdeburgan juron kaj fariĝis laŭjure la plej malnova urbo de Pollando. En la 13a jarcento ĝi estis ankaŭ la centro de la sal- kaj drap-komerco. En la 16a jarcento ĝi spertis ekonomian disvolviĝon, kaj interalie estis en ĝi konstruita bierfarejo. Złotoryja en la sekvaj jarcentoj perdis sian gravan rolon pro inundoj, brulegoj kaj militoj.

Al la vidindaĵoj de la urbo apartenas interalie: la historia urboparto, la preĝejoj (12jc/14jc), la mezepoka Pordego kun la kasteluro Kowalska (14jc), la mezepokaj defendomuroj (14jc), la muelejo (14jc), la akvoturo (17jc) kaj la torturejo (18jc). Valoras viziti ankaŭ la orminejon *Aurelia* kaj la muzeon de oro.



Ĉiaj informoj estas riceveblaj ĉe la adreso: [informado.eo@gmail.com](mailto:informado.eo@gmail.com) (skribu en la temo de la mesaĝo: majrendevuo) aŭ telefone +48 692 551 131, +48 694 229 219 [www.ecem.com.pl](http://www.ecem.com.pl)